Laŭzana Esperanto-Societo
Junio 2021 - n-ro 6

# Laŭzana informilo

## Venontaj kunsidoj:

- Lu, la 6an de septembro *Gramatikaĵoj*
- Lu, la 4an de oktobro *Karlota prelegos*
- Lu, la 1an de novembro *David prelegos*
- Lu, la 18an de decembro *Zamenhofa festo*

*Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe :* ***eventaservo.org/o/LES***

## Sabate la 12an de junio 2021 je la 10a
**ni ekskursos al**
**la *Svisa Orgena Muzeo* de Roche**
**kaj poste tagmanĝos en Villeneuve**
organizita de Knud



## Ekskurso 2021

**Ni veturos automobile kaj rendevuas je la 9a kaj duono antaŭ la stacidomo de Villeneuve. Perfekte eblas iri trajne.**

Ni vizitos la muzeon kiu prezentas orgenojn de la plej antikva periodo ĝis la nuno.

Post la tagmanĝo en restoracio de Villeneuve ni proponos promenadon, ne foran, en stranga ĝardeno apud *Les Grangettes.*



*« La Gondola Veneziana ».*

<u>Menuo 1</u> :
- Melono kaj kruda ŝinko
- Bovida rostaĵo kun pastaĵoj kaj legomoj
- Deserto de la ĉefkuiristo

<u>Menuo 2</u> :
- Tomatoj kaj mocarelo
- Kokida « piccata » kun tomatsaŭca spagetoj
- Deserto de la ĉefkuiristo

<u>Menuo 3</u> :
- Sezona salato
- Pico el ligna bakforno laŭplaĉe
- Deserto de la ĉefkuiristo

Bonvolu, <u>ĝis la 7-a de junio,</u> kiel aliĝilo, **pagi sFr 40.-** (la prezoj de la muzeo kaj de la restoracio) al la « speciala » poŝtkonto CCP 10-20656-3 (**atentu … ne estas tiu de la nia societo**) … IBAN CH17 0900 0000 1002 0656 3

Vi ankaŭ povas pagi per Twint al mia 076 411 14 55. Sendu samtempe mesaĝon dirante kiun menuon vi elektas. Dankon. Francisko

**Laŭzana Esperanto-Societo**
pa. F. Randin
ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com/esperantolausanne
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8


**<u>Komitato 2020</u>**
Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto: Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

## La komitato informas:

**Nia programo aperas en** https://eventaservo.org/o/LES

**Babilada Rondo**
ambaŭgrupe je 19h00:

Ve, la 21an de majo
ĉe Charlotte Blanc Maillard
Avenue Nestlé 7, Vevey
021 922 34 74
079 393 32 63




Ni ricevis mesaĝon de *Miguel Gutiérrez Adúriz*, sekretario de la *Belartaj Konkursoj de UEA*, kiu konfirmis, ke nia broŝuro …




…partoprenos la konkurson 2021 en la kategorio « infanlibro ».

|  |  |  |  |  |  |  |  |  |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
|  | 9 | 1 | 3 |  | 7 |  |  |  |
|  | 2 |  |  |  |  |  | 3 | 7 |
|  |  | 6 |  |  | 2 | 5 |  | 1 |
| 8 |  | 4 |  | 3 |  |  |  | 9 |
|  |  |  | 6 | 7 | 9 |  |  |  |
| 7 |  |  |  | 1 |  | 2 |  | 3 |
| 6 |  | 5 | 7 |  |  | 9 |  |  |
| 9 | 8 |  |  |  |  |  | 2 |  |
|  |  |  | 9 |  | 6 | 3 | 4 |  |



Vidita en la metroo de Parizo

|  |  |  |  |  |  |  |  |  |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 4 |  |  |  |  | 6 |  | 2 |  |
|  |  |  | 3 |  |  | 9 | 6 |  |
|  |  |  |  |  | 5 | 1 |  | 8 |
|  | 7 |  |  | 3 |  |  |  | 6 |
|  |  | 8 |  | 9 |  | 7 |  |  |
| 3 |  |  |  | 2 |  |  | 9 |  |
| 7 |  | 6 | 2 |  |  |  |  |  |
|  | 4 | 5 |  |  | 9 |  |  |  |
|  | 3 |  | 7 |  |  |  |  | 2 |

Dek elsendoj de Claude Piron:
*youtube.com/user/DannirLsne*



1931 – 2008

Rakonto en 5 historioj verkitaj de 13 el niaj membroj.

# LA FANTOMOJ DE LA LAGO

*versio B, parto 2*

Maksimo aldonas: *«La policо venis ŝipe serĉadi kun grandaj lumĵetiloj dum du aŭ tri tagoj. La policistoj neniam trovis la korpojn de la tri malŝanculoj. Unu semajnon poste reaperis la barko … malplena. Mi legis enrete, ke rapide en la regiono naskiĝis legendo pri tiu dramo. Eĉ plaĝa trinkejo bazigis sian propagandon anoncante: «Venu trinki ion en nian drinkejon kaj eble vi bonŝanĉos vidi la fantomojn de la lago.» Male la estro de la apuda restoracio* “Ĉe La Du Amikoj” *furiozas pri tiu propagando malsana. Tamen li devas konfesi, ke multaj klientoj venas manĝi nur esperante aŭdi la raŭkan voĉon de la hantuloj.»*

Post longa silento Julia diras, ke estus agrable por Maksimo iri surloken kaj manĝi kune “Ĉe La Du Amikoj”. Mi ne plu scias, kion pensi.

Strangas al mi, ke tiu dramo povas krei tielajn fantaziaĵojn. Mi konfesas, ke mi dubegas, ĉu iu, io ajn povus aperi surlage. Tiu ideo forestas de mia raciema pensmaniero. Tamen mi perrete rezervas tablon por la samtaga vespermanĝo “Ĉe La Du Amikoj”.

Posttagfine ni promenadas borde de la lago; mi klarigas al ili la historian dramon veran de la cunamo en la jaro 563 … kiam la ondmuro je 8 metroj alte trairis la lagon ĝis Ĝenevo.

Mi proponas lui barkon. Trankvile remante ni silente pensas al la tri dronitoj kiel por forturni la sorton kaj desorĉi la lagon.

Ni preterpasas la drinkejon antaŭ eniri la restoracion. Ni mendas tablon apud la fenestro. En la menuo: “melono, famaj perkfiletoj kaj sorbeto.” Postmomente la ĉielo nigriĝas; fulmotondro aŭdiĝas. La atmosfero fariĝas pli kaj pli etosdrama.

*«Amikoj miaj, ŝajnas al mi, ke la ĉielo preparas fulmojn similajn al tiuj de via rakonto»,* mi diras. *«Nekredeble»,* aldonas duonvoĉe Maksimo videble impresita. *«Bonŝance ni ne plu estas en la barko»,* aldonas Julia. Mi bone konas la lagon. Somere fulmoj kun tondroj ofte okazas sed tiel fortajn, mi vere neniam vidis. La vento pli kaj pli fortiĝas kaj la lumturo, kiu avertas la ŝipojn pri danĝero, ĵus ŝanĝas kaj rapidigas sian ritmon. Mi informas miajn kunulojn: *«Vidu, tiu ritmo de la lumturo signifas danĝeregon. Ĉiuj lagveturiloj devas rapidege enveni al la plej proksima haveno.»* Vesperfine pluraj el la klientoj forlasas sian tablon por deverande rigardi la spektaklon de la furioza lago. Subite fulmotondras tiel forte, ke la domo tremas samtempe, kiam subite la lampoj estingiĝis en la tuta restoracio.

:

# Intervjuo de Markus Sanz , fidela membro de LES.

(Fare de Francisko)



*Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfraze.*

**En Berno mi naskiĝis en 1947. Kiam mi kvinjaraĝis miaj gepatroj al Ĝenevo moviĝis kie mi vivis mian adoleskan periodon. Poste mi studis en la *Belarta Lernejo* antaŭ metii en la arta kampo, kiel pentristo, filmisto, grafikisto, ktp. Inter 1974 kaj 1985, mi ankaŭ laboris tramonde kiel delegito de la *Ruĝa Kruco*. Reirante Svisien mi edziĝis, patriĝis kaj profesie instruistiĝis en vidartinstitucioj.**

*- Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?*

**En 2015 mi engazete legis interesan intervjuon de Claude Piron kaj tiel malkovris esperanton.**

*- Kiam vi decidis studi esperanton?*

**Ĉar mi scipovas plurajn lingvojn kaj ŝatas studi novajn, mi tuj faris la kurson de *Lernu* kaj legis *“Gerda malaperis”.* Finfine mi provis renkonti Claude, kiu invitis min veturi kun li - samvespere - ĉe Francisko, kie li devis prelegi al la laŭzananoj. Samjare mi aliĝis al LES.**

*- Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?*

**Ne tre favore… ĉiuj konsideras esperanton kiel stultaĵo.**

*- Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?*

**Miaj tri filoj interesiĝas iomete pri esperanto sed ĉiam diras, ke “nun” ili ne havas sufiĉe da tempo por studi. Amuze, kiam mi skribas al ili … ofte estas esperante.**

*- Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?*

**Mia unua kaj nura UK-o estis en Lillo - Francio en 2015. Tamen mia plej bela memoraĵo, rilate al esperanto, estas la ekspozicio preparita de LES en la forumo, por kiu mi donacis miajn artajn kaj grafikajn kompetentecojn kaj informmaterialojn al la preparanta grupo. Nun, ĉar Ĝenevo pli proksimas de mia hejmo, mi pli aktivas en *la Stelo*, la ĝeneva asocio, ol en Laŭzana.**